

Generala Ligo de la Blinduloj de Flandrujo

(ALGEMEEN BLINDENVERBOND VAN VLAANDEREN)

EDITORO : **FITEN Frans**

29, Rijselschebaan

Antwerpen-West

Postceko : 195,224



7009
1. 11. 1981



IMPRIMERIO P. JOOSTEN-CORNET
Geldofstr. 43 — ANTVERPEN-O-W.

ERRATO:

g = gh

j = jh

s = sh

c = ch

Muzikemuloj Blindulamikoj.

Men du la belegajn 3 muzikalojn de FRANS
FITEN „**20 jaar**“ (20 jaroj) „**Saccapela**“
(moderna danco) „**Borms**“ (kanto).

Preco : Flandrujo - Franco : Fr. 15.- — Neder-
lando : Fl. 1 1/2 — Englando ; £ 0-2-6 — Germa-
nio RM. 3 — U. S. A. \$ 1.-

Ĝenerala Ligo de la Blinduloj de Flandrujo

(ALGEMEEN BLINDENVERBOND VAN VLAANDEREN)

EDITORO : **FITEN Frans**

29, Rijzelschebaan

Antwerpen-West

Postceko : 195,224

oo

STUDO

pri la Eduko de la Flandraj Blinduloj kaj la Blindul-antaŭzorgo.

Eksterlandanoj, kiuj nur konas Flandrujon kaj Nord-Nederlandon el libroj, versaĵe opinios, ke la situacio de la flandraj blinduloj estas, el socia vidpunkto, pli bone ol tiu de iliaj samsortanoj el aliaj landoj, car la granda duonblinda populogitano Pieter de Coninck alportis ja per sia mondfama Batalo de la oraj spronoj en 1302, la demokration al gravaj populgrupoj de ocident-Eŭropa.

Plie, diversaj flandraj pentristoj kaj verkistoj altiris la atenton al la socia kaj kultura situacio de la blinduloj.

Do, konkludas ĝi interesiganta fremdulo, la situacio de la blinduloj vidigis en la flandra socio, tiel ke Blindul-edukado kaj Blindul-antaŭzorgado tie estas modelo por la mondo.

Damage tio ne estas vera.

En Flandrujo ne ekzistas deviga Blindul-instruo; dum franca Belgujo (Valonujo) posedas dekduon da blindulpresejoj, Flandrujo ec ne havas.

La flandraj blinduloj estas tute apartigitaj de sia natura kulturcentro Nord-nederlando (Holando). La malalta belga valuto malhelpas al ili sin prokuri la karajn nord-nederlandajn blindul-librojn kaj mem ili ne posedas taŭgajn blindullibrejojn kiel la Valonoj.

Tial ke la instruo por la blinduloj ne estas devigata de la belga stato kaj ne estas farata bona propagando por ĝi de la

publikaj administracioj, multaj blinduloj vivas en malriceco kaj devas almozi-peti.

Pro tio la hipokritaj bonfaraj societoj tie are floras kaj tiamaniere helpas konstantigi la malbonajn situaciojn farante ilin iom portebblajn.

Por doni al la mondo gustan ideon pri la sorto de la flandraj blinduloj, ni jene dividos nian studon :

1^e — La flandraj blinduloj kaj ilia socia mezo ;

2^e — Estigo de moderna koncepto pri blindulemancipado kaj Socia-Antaŭzorgo ;

3^e — Statistikoj ;

4^e — Kaŭzoj de blindeco ;

5^e — Kulturaj institucioj kaj lernejoj ;

6^e — Blindul-Antaŭzorgo kaj la statopinio ;

7^e — Jura zorganteco en la statuto de la flandraj blinduloj en la belga Stato ;

8^e — La emancipad-batalo de la Generala Ligo de la Blinduloj de Flandrujo ;

9^e — Generalaj rimarkoj, situacioj kaj celoj.

I. — La Flandraj Blinduloj kaj ilia socia mezo.

Geografie la flandraj blinduloj apartenas al la belga Stato ; lingve ili estas Nederlandanoj.

La sekvo de la supredirita fakto estas por ili terura.

Ekzistas ja 15.000 blindaj Flandroj, el kiuj ne 1000 guis instruadon. Ĉar sciu, la france-aldirektata Statregistaro ne faras propagandon por la blindulinstruado de la Flandroj. De Nord-nederlando la blindaj flandroj estas apartigitaj per Stata limo. La granda aro da gepatroj ec ne scias ke ekzistas blindulpensionoj, la komunumaj kaj provincaj estraroj sendiferente lasas kreski la blindulojn en nescio.

La registaro ja subtenas la blindan almozi-petanton kaj senprofesiulon per almozoj kaj publika subvencio, sed kuragigi la blindulinstruadon kaj subteni la flandrajn blindajn artistojn kaj manlaborist(in)ojn gi ne faras.

Tute kontraŭe.

La humiliiga bonfaro kaj la blindul-ekspluado estas kuragigitaj.

Flandrijo havas altstarantan kulturon kajli teraturon kaj arton; sed kio ĝi estas, ĝi cerpas ĝin el propra popolforto.

La Statregistaro ne altigas; kontraŭe.

De tio la kruela stato de la grandega aro da flandraj blinduloj.

Estas honto por la lando, ke la blindulinstruado ne estas deviga, kaj ke pro tio nur malgranda parto de la flandraj blinduloj povas viziti la blindulpensionojn.

Pli granda krimo ankoraŭ estas ke la instruataj blindaj artistoj kaj manlaborist(in)ojn preskaŭ ne obtenas laboron. La Stato kaj ĝiaj estroj solaj pri tio estas kulpaj; car :

1° — Estas la Stato, kiu devas montri al la popolo sian devon sendi al lernejo blindajn infanojn kaj doni fruktan laboron al instruataj blinduloj.

2° — Estas la Stato, kiu devas plani leĝojn kiel la „devigan blindulinstruadon“ kaj „blindul-antaŭzorgon“;

3° — Estas la Stato kiu devus starigi konvenan blindulpresejon, sub kontrolo de la flandraj blinduloj, en Antverpeno, kaj taŭgajn blindullibrejojn;

4° Estas la Stato kiu energie devus subteni cian nobligan kulturan kaj socian provadon de la flandraj blinduloj.

La registaro en tio nenion faris, male, ili tenas la popolamason en sensaga stato per sentimentala bonfaro kaj detestanta, pan-rabanta plendkantoj-legendo.

Patriotaj bonfarsocietoj de nekonata famo (precipe kiam ili havas francan nomon) disponas je vastaj subvencioj per helpo de servema gazetaro, iluziigas la popolon ke blinduloj estas mizeruloj, kiuj nur estas bonaj por ke oni donu al ili almozon kaj por ke oni plendu ilin.

Al mizeruloj oni ne donas laboron, male almozojn.

Tio estas la celo de preskaŭ ĉiuj t. n. „naciaj blindul-bonfar-societoj“. Al blindaj laboristoj oni pagas „malsat-salajrojn.“

Ni konas blindul-bonfar-laborejojn, kiuj plendante kaj kriante pagas 35 fr. ĝis 80 fr. po semajno al blindaj laboristoj.

Cio kio estas humilige bonfarema rilate al la blinduloj aŭ franclingve (kvankam la granda plimulto de la blinduloj estas Flandroj!) guas subtenon kaj subvenciojn je ciuj formoj.

Cio kio servas al la edukado, altigo kaj emancipado de la blinduloj sur materia kaj soiritaj kampo estas malhelpata.

La tenado de la flandraj blinduloj en malsaga stato kaj ilia subpremo estas ja la plej granda honto en okcident-Eŭropo.

La malnobleco de la subpremado klarigas la belon de la hom, kaj artama emancipbatalo de la **Generala Blindulligo de Flandrujo**.

II. — Estigo de moderna koncepto pri Blindulemancipado kaj Socia Antaŭzorgo

Longe daŭris tiu blindulsubpremo, sed la mondtremiga milito cion revertis.

La studanta blindul-junularo sentis la eblecon de emancipbatalo. Sed antaŭpreparo dumjara estis necesa por atingi bonan organizacion.

La intelekta blinda-junularo logis dise.

Tiuj kiuj kunestis en lernejoj estis devigataj sin organizi sekrete kaj bezonis studi la ligan vivon.

Nur jarojn post la milito, kiam la plej antaŭstarantaj blinduloj ekforlasis la blindulpensionojn la flamo levigis. La volo estis !

Tiuj blindullernejoj mem organizis celante kanalogi la blindulmovadon; la aliaj kase lasis fari la blindajn studentojn, kiuj plejparte ja ekforlasis la lernejon.

Sed estis diversaj konceptoj kaj sekve diversaj blindulkluboj.

Je komenco de 1925 interkoncento okazis inter la iamaj blindul-studentoj, la flandra nacionala Blindulligo kaj la flandraj katolikaj studentoj.

La centra organizacio de flandraj nacionalaj Blindullibro-roj fondigis kaj ĉe estis lege rekonata la 16-6-25. Stata gazeto n° 391.

Tio konsistigis multan teorion kaj praktikan laboron; sed

gi ne kapablis grupigi la amason de la flandraj blinduloj diversopiniaj.

Nur la 27a de junio 1928 nova Ligo fondigis (Stata gazeto n° 565).

Post longaj preparoladoj, provizora kunlaboro kaj pluraj kunvenoj estigis la „Generala Blindulligo de Flandrujo en Antverpeno (okc.)

Tiu ligo de ciuj flandraj blinduloj kaj blindulamikoj de tiam konstante laboras kaj batalas.

Ciam novaj elementoj kiuj for lasis la lernejon fortigas la organizacion.

Se ni kapablos obteni la devigan blindulinstruon ni estos suface potencaj en malmultaj jaroj venki la blindulsubpremanojn.

III. — Statistikoj.

Ni ne povas atendi seriozan statistikon de tia blindul-mal-
atenta regimo,

De la centoj de blinduloj, kiujn ni persone konas hazarde (?) ne lo estas konataj kiel blinduloj en tiu statistiko. Neniu blindulo komprenas kiel oni tiamaniere fufaras statistikon.

En 1904 estis 2.000 blinduloj; en 1906 oni ilin taksis je 4.500.

Ni povas certigi al vi ke neniam okazis serioza nombrigo.

La plimulto de la blinduloj scias, ke neniam oni faris precizan statistikon pri la nombro da blinduloj.

En 1919 estis oficiale 3.000 blinduloj, el kiuj proporcie 4 viroj kontraŭ 3 virinoj.

Efektive estas tiom da blindaj virinoj kiom da viroj; apogante sur la oficiala statistiko oni do jam povas diri, ke 450 estas tro malmulte enkalkulitaj.

Krom tio oni ne enkalkulis unu laborinvalidon aŭ tiujn kiuj estas pli-malplibonhavaj aŭ ricevas laborpensionon.

En la ministeriaj rondoj oni nun taksas la nombron da blinduloj je 5 aŭ 6.000 en Belgujo.

Ci tiu nombro estas ja 4 aŭ 5 foje pli granda.

Por doni ekzemplon : oficiale estas 88 militblinduloj; sed efektive estas almenaŭ 500 aŭ 600 militblinduloj.

Car por esti rekonata kiel militblindulo, oni bezonas certan influon por esti rekonata kiel tia. Tuta aro da kapriculoj decidas **cu** iu estas militblindulo aŭ ne.

Kiu ne konas en sia mezo iun aŭ alian eks-militanton, kiu estis „ kaptita de l' gaso “ kaj nune nun **igas** blinda?

La registaro ne rekonas tiujn eks-militantojn kiel militblindulojn. La cifero 88 estas ciuokaze tro malalta.

Estas proksimume 400 aŭ 500 blinduloj-lernejanoj.

Estas 250 knabaj kaj 170 knabinaj studentoj.

St-Lambrechts-Woluwe (Bruselo), 115 knaboj, (Kelkfoje pli ol 150)

Bruselo (Monahinoj de l' Amo) : 70 knabinoj; Brugio : 30 knaboj, 25 knabinoj; Liejo : 17 knaboj kaj 14 knabinoj; Maeseyck : 20 ce la monahoj kaj 25 ce la monahinoj; Ghlin : 49 knaboj kaj 35 knabinoj; Berchem-apud-Bruselo : 27 knaboj.

La nombro da blindaj studentoj estas tre sanganta.

Krom tio estas 118 malfelicaj blinduloj ce la idiotoj kaj aliaj malfeliculoj.

IV. — KIALOJ DE BLINDECO.

Estas tre malfacile indiki la precizan kialon de la blindeco de la plimulto de niaj Flandraj Blinduloj, car la Belga registaro neniam faris seriozan nombradon de la blinduloj; malpli ankoraŭ serci la kialon de ĝi.

Tamen ni povas konstati, ke multaj **igas** blindaj :

1. Per la **naskigo**. Ekzistas ja lego de Septembro 1924, kiu ordonas al la bakistoj, je grava puno, sciigi ciun kaŭzon de okulmalsanigo al kuracisto. Ni scias ankaŭ, ke la profilaktika okulgutado per malforta salpetracida argentsolva savas la plimulton de la blindaj infanokuloj : sed tiun legon oni **ec** ne sajnas koni en multaj urboj kaj en la vilagoj oni ja nenion scias pri ĝi : Kiam estos tro malfrue oni iras al okulisto !...

2. Per la **milito**. La gasmilito **precipe** faris centojn da Flandraj blinduloj. Ciutage militintoj, kiuj estis kaptitaj dum la mondmilito de la „ gaso “ **igas** blindaj ;

3. **Infanaj malsanoj**, morbilo, malbona kunkreskado de la palpebroj, perdigo de la okuloj, netravidebleco de la korneo; senbrilo de la lenso (katarakto);

4. **Lud-kaj laborakcidentoj**. En Flandrujo estas centoj da blinduloj, kiuj igis blindaj per sensingarda ludo, kiel ekzemple : jetado de stonoj, pafado, piedpilkado kaj saltado.

Centoj da laboristoj : kaldronegpurigistoj, metalurgiistoj kaj aliaj, kiuj devas labori ce la Antverpena haveno kaj alie en senhigienaj cirkonstancoj, igis tie okulmalsanaj aŭ blindoj.

Ci tiuj estos proksimume la cefaj kialoj de blindeco. Se la stato volus, la nombro de Flandraj blinduloj povus antaŭ du-dek jaroj facile malpliigi je 70 %.

Neniu serioza antaŭrimedo estis iam decidita.

La Flandra sana popalvolo kaj la mondkonscienco havas en cio tio kiel unua devo helpi nin senkondice kaj forte.

V. — Kulturaj Institucioj kaj Lernejoj.

Pri la lernejoj kaj kulturaj institucioj, Flandrujo ne povas rakonti multan bonon pri la legdonantoj.

Ne ekzistas devigan blindulinstruadon kaj la kulturaj kaj sociaj institucioj de la Flandraj blinduloj ricevas nesufican statapogon.

La blinduledukejo de **Sint-Lambrechts-Woluwe (Bruselo)**, fondita en 1835, administrata de la T. H. monaĥoj de Amo-Joris Hendriklaan, 298, tamen povas esti konsiderata kiel unu el la plej bonaj blindulinstitutoj de la mondo.

La Flandraj Blinduloj estas tie instruatoj laŭ sia ras-kaj personaj kapablecoj kiel bonaj muzikartistoj, literaturistaj aŭ kapablaj matistoj aŭ korbistoj.

Ci tiu edukejo povas konkuri kun la plej bonaj malaltgradaj meti-kaj muziklernejoj.

La instruado kaj edukado estas farata de kapablaj kaj sindonaj monaĥoj. El ci tiu institucio eliras pli da kapablaj blinduloj, taŭgaj por fari la vivlukton sukcesplene, ol el ciuj aliaj blindulinstitutoj kune.

La Belga punktskribado, kiun oni povas legi per unu fin-

gro, estas la plej bonz kaj plei facile legebla. Ci tiu punktskribado devenas de St.-Lambrechts-Woluwe kaj la pli granda, pli malfacile legebla Franca Brailleskribado estas nur **pli malfrua** devenigo de **gi** kiu estas malpli praktika, malpli bona. La Flandra blindulstenografio estas ankaŭ de tiu instituto kaj devus esti uzata en tuta Nederlando kaj Transvalo. La Flandraj kaj Nederlandaj blinduloj multe profitus de **gi**.

Ci tiu institucio posedas ankaŭ malgrandan muzeon de blindulskribadoj de aliaj epokoj komence de la vaksaj tabuloj gis ilia moderaa blindulpunktskribado.

De la 3-4 jara ago blinda knabo estas tie instruata gis la 20 a.

La plej novaj instrumentoj estas tie ciam aplikataj.

Instruataj lingroj : Flandra, Esperanto, Franca, Germana, Angla.

Instruata muziko : notoj, kantado, fortepiano, violono, violoncelo, orgeno, klarneto, hoboo, fluto, kupraj instrumentoj k. a., cetere : agordado de fortepianoj kaj riparadoj.

Instruata manlaboro : matado, korbfarado; masinskribado kaj cigarfarado.

La punktskribado de ci tiu instituto estas la plej praktika tiel por vortoj, muziko, ciferoj, kiel por stenografio.

Intruatajoj : Historio, geografio, higieno, kalkulado, algebro, legado, fiziko, redaktado, k. t. p.

Same kiel la plimulto el la blindulinstitutoj tiu de St. Lambrechts-Woluwe havas malgrandan blindulpresejon por propra lernejan uzadon, same kiel sian klas-kaj lernejbibliotekon.

Ankaŭ **gi** havas la plej bonan Blindulmuzikistaron el la lando, kiu ofte havas okdek membrojn.

Ci tiu blinduledukejo povas fieri pri la plej admirinda aro de bonegaj blindaj lernintoj.

En **Maeseyck** (Limburgo) estas du institutoj; unu por blindaj knabinoj, fondita en 1840, administrata de la honahinoj de Amo el Tilburg (Nederlando).

Ci tiu instituto ankaŭ akceptis knabojn gis 1862 gis kiam la Monahoj de Amo el Tilburg reprenis la gvidadon.

En **Brujo** estis fondata en 1836 de la kauniko Carton

blindullernejo por knabinoj kaj knaboj en apartaj sekcioj. Ĝi estas administrata de monaĥoj, helpataj de la Monahinoj de l'Infaneco de Mario.

Kiel oni povas konstati, estas nur unu bona instituto por knaboj: por knabinoj ne ekzistas en Flandrujo bona blindulinstituto. Je tiu laborkampo multo povas esti plibonigata.

Al neniu Flandra Blindula estas praktike eble ricevi per sia lingvo altgradan instruadon.

En **Bruselo** estas ankoraŭ blindulinstituto de 1835, administrata de la Monahinoj de Amo (Papenvest); ankaŭ estas en **Berchem-St-Agatha** provinca blindulinstituto, malfermita en 1903. Ambaŭ estas cefe francaj kaj malpli kompetente kaj celtrafe arangitaj ol ekzemple tiu de St-Lambrechts-Woluwe.

Krom la instituto de Sint-Lambrechts-Woluwe estas neniu, kiu havas grandan konstruan signifon por la Flandraj blinduloj.

Kaj ĉi tiu instituto ne povas sufiĉe sentigi sian bonfaran influon. Kial?

Ĉar la „deviga blindulinstruado komence de la 5a jaro kaj dum almenaŭ 10 jaroj“, kiun la intelektaj blinduloj petis, neniam estis akceptita.

Rezultato! Pli ol 10.000 Flandraj Blinduloj neniam estas sendataj al lernejo; centoj da Flandraj blinduloj estas sendataj tro malfrue (10 ĝis 16 jara!) al blinduledukejo.

Oni almozpetas kun blindaj infanoj sur la brako aŭ ce la mano; la urbestroj favoras tiun almozpetadon de blindaj infanoj aŭ pli maljunaj blinduloj por... ne trograndigi tian publikan subtenadon.

La Belga registaro faris ja en 1912 legon pri la protekto de la infanoj, malpermesante la almozpetadon kun blindaj infanoj, sed ni konas dekojn da komunumoj, kie oni tion favoras

Tiu privata almozpetado ekzistas ankaŭ kiel grupa almozpetado; tiam tio nomigis „bonfara (?) societo.“

Ĉi tiuj bonfaraj societoj aŭ privata almozpetado (per almozpetado ce pregeja pordego aŭ dum kirmeso akz., blindulo povas gajni 300 frankojn ciutage!) senkuragigas la laboremajn blindulojn.

Car ne ekzistas „deviga blindulinstruado“ kaj „serioza blindulantaŭzorgado“, hodiaŭ ne 1.000 de la 15.000 blindaj Flandroj estas kapablaj por memstare gajni sian panon.

Car tiuj 1.000 do esta malplimulto, la popolo opinias, ke **ciuj** blinduloj estas nekapablaj por gajni sian panon. Se oni nur havigis al ili laboron!

Sed precize pro tiu privata almozetado kaj la krima bon(?) farado la popolo kredas, ke blinduloj ne povas serioze labori.

Tia! la „Algemeen Blindenverbond van Vlaanderen“ (Generala Blindulunuigo de Flandrujo) sendis diversajn alvokojn al la 1.500 Flandraj komunumestraj, al la 5 Flandraj provincestraj kaj al la Statestraro.

La „deviga blindulinstruado“, la „Flandra Blindulpresejo en Antverpeno“ kaj pli bona „socia blindulantaŭzorgado“ devas kaj estos enkondukataj.

De vilago al vilago, de urbo al urbo, de societo al societo, dum **ciuj** niaj festoj kaj publikaj kunvenoj, ni sciigis **ci** tiujn postulojn. La Flandra popolo interesigas malrapide sed certe por niaj postuloj kaj jam estas signoj de sajncedoj kaj havata (sed forta) kontraŭstaro, kiu pli kuragigas nin.

La mondkonscienco devas postuli kun la Flandraj Blinduloj la elservutigon!

VI. — BLINDULANTAUZORGO KAJ STATOPINIO.

Dum la mezepoko oni blindigis la politikajn malliberulojn aŭ klerajn elpensintojn, kiuj posedis statsekretojn kaj oni metis ilin sub la kontrolo de la Jugopovo.

Ci vi scias ke la Belga Stato regas la Germanojn de Eupen kaj Malmedy per la Ministerio de Justico t. e. per la sama kiu regas la friponojn, malsagulojn, politikajn malliberulojn, elpelitajn (t. e. „malbonajn Belgojn“ kaj surdmutulojn kaj blindulojn).

Nur kelkaj barbaraj popoloj toleras la blindigon de kontraŭstarantoj.

Belgujo siŭ metas sur mezepokon koncepton kaj regas la blindulojn per la Ministerio de Justico.

La oficiala, malsimpatia sinierado, kiun ni nomos la „statopinion“ havas timigajn, abomenajn sekvojn precipe por la flandraj blinduloj!

Pro tia oficiala detesto, kin valoras diplomon de nekapableco kaj senvaloreco la popolamaso maljuste taksas la blindulojn.

La plimulto de la gepatroj ne konas la ekziston de blindulternejojn — kaj ja ne ekzistas deviga instruado. Pro tio certe 14 - 15000 blindaj flandroj ne guis instruadon.

Multaj komunumoj toleras ke oni almozpetigas blindajn infanojn, aliaj publikaj administracioj donas „sumetojn“ al la gepatroj kinj mem prizorgas (?) siajn blindajn infanojn.

Ciusecaj impostliberigoj kaj subvencioj protektas je vengkrianta maniero la publikan bonfaremon, kiu ofendas la blindulojn, ilin pritrkatas kiel senutilajn malfeliculojn, plendindajn senkabablulojn.

Plie oni deziras prezenti la instruatajn blindulojn kvazaŭ ili estus sinkapablaj gajni sian panon. Tiel oni forrabas artifice la panon al la 15000 blinduloj flandraj.

Blindulo kiu provas gajni la vivon memstare, sed kiu deziras aceti muziklibrojn aŭ instrumentojn k. c. ne estas helpata.

La laboro aŭ la arto de la blindaj laborist(in)-oj estas imposttaksata kiel tiu de la vidantoj.

Sub la vipo de la popologado de la „Generala Blinduligo de Flandrujo tamen estas akiritaj sajn-submetigojn flanke de la registaro.

1^o Príncipe (sed sen sankcioj kaj sen informigo) deklaras la lego la dezireblon de la blindulinstruado sed ne ekzistas devigo.

2^o Vocdonita estas jara stathelpo de 3.600 fr. por ĉiu helpbezona blindulo.

Kial ne senhezite „la devigan blindulinstruadon de la 5a jaro koj dum almenaŭ 10 jaroj kaj stathelpo de 5000 fr. al ĉin blinduloj“ kiel apogo por aceto de labor - aŭ studmaterialo aŭ kiel subvencio?

Kial neniu reprezentanto de la flandraj blinduloj estas tolerata en la komisiono por stathelpo?

Dependos de la kunlaboro de la blindaj artistoj kaj gelaboristoj kaj veraj blindulamikoj por cesigi tiujn mezepokajn situaciojn.

VII. — SUB ZORGO DE LA JUGPOVO AŬ LA STATUTO DE LA FLANDRAJ BLINDULOJ EN LA BELGA STATO.

La instruado de la blinduloj dependas ĉi tie de la Ministerio de Justico. La instruado de la blinduloj do estas lege egaliĝata kun tiu de la friponoj kaj malnormaluloj.

Tio havas premantan influon sur la blindulojn kaj ilian familion. La popolamaso konsideras do la blindulojn kiel malfeliculoj, mizeruloj.

Tiu justiczorganteco ankaŭ ekzistas rilate al subteno aŭ rilate la oficdemonon en stataj koj muzikaj lernejoj k. c.

Plie la blinduloj, malsanuloj, malnormaluloj k. a. estas uzataj por neŭtraligi la „generalan voĉdonrajton“ kaj falsigi la voĉdonadon je granda skalo je profito de la potenculoj.

Ni prenu ekz. la situacion en Antverpeno, kie eble ja vivas 800 blinduloj.

Familia membro ne rajtas voĉdoni por la blindulo kiun li kondukas, se li ne havas ateston de kuracisto.

Tia atesto kostas la ofte malricajn blindulojn po 30 fr.

Sed iliaj t. n. bonfaremoj societoj helpas laŭ sia maniero la blindulojn. Ili serĉas la blindulojn en iliajn hejmojn kaj ilin kondukas al la voĉdonejoj, posedante la ne cesajn atestojn, kaj tie evidente voĉdonas por la subpremantoj de la blinduloj mem.

En Flandrujo estas 15.000 en Valonujo 9000 blinduloj. Tio faras 24.000 por aŭ kontraŭ, sekve la blindulsubpremo raportas al la potenculoj jam 48000 voĉdonojn.

La aliaj jam nomitoj kategorioj estas traktatoj sammaniere, kio montras al vera saĵdemokratio, kin reale kansas diktaturon.

El tio estas klarigebla la neemancipado ne nur de la flandraj blinduloj sed ja de la tuto flandra popolo.

Nur la nacia kaj internacia movado de la „Generala Blindulligo de Flandrujo“ (Antverpena okcidento) helpataj de

ciuj kulturaj asocioj de la tuta lando povas alporti la emancipadon.

La flandraj blinduloj nur devus vocdoni en la cefejo de sia distrikto, **sole** per blinda skribo ; la deviga instruado kaj plibona socia antaŭzorgo devus estigi.

Por Flandrujo kaj la blinduloj de la tuta mondo estas do la plej grava afero fortigi la potencon kaj influon de la „ **Generala Blindulligo de Flandrujo** “.

VIII. LA EMANCIPADBATALO DE LA « GENERALA BLINDULLIGO DE FLANDRUJO.

Por bone komprenigi al la blinduloj kaj la blindulamikoj kion volas la nova generacio de flandraj blinduloj kaj blindulamikoj, ni mencias ci tie kelkajn atikolojn el niaj statutoj aperintaj en la **stata Gazeto** n^o 565 de 27-6-28.

Je tiu dato nia sekreta acocio igis oficiala kaj lege rekonata. Pro tio la mankoj kaj difektoj estis publike diskonigataj kiel ankaŭ la rimedojn por helpi al ili.

CHAPITRO I.

NOMO, SEGO, CELO KAJ DAURO.

Art. 1. — Per ci tio estas starigita asocio sen profita celo sub la nomo : La **Generala Blindulligo de Flandrujo** (asocio de flandraj blinduloj kaj blindulamikoj) nigra stelo sur flava kampo).

Art. 2. — Lo sego estas en Antverpeno (Okc.) 29, Rijselschebaan.

Arti. 3. — La asocio celas : la emancipadon de la blinduloj por akiri plibonigon de sorto kaj sociajn kaj homajn rajtojn ; klopodi por certigi al la blinduloj memstaron, laboreman, noblan ekzistadon por kaj per la popolo per propra laboro kaj arto ; krei la eblecon por blindulantaŭzorgo, deviga blindulin-

struado kaj edukado, socia edukado (necesige por blinduloj) kaj daŭrigatr metia, socia, muzika. Kaj kultura emancipado de la blindaj laboristoj kaj artistoj: la eligon de ĉiuj panrabantaj, de-
testantaj, antaŭzorgoj legendoj pri t. n. senhelpaj, senkapablaj
blinduloj unuvorte provi eksciti ne kompaton sed komprene-
man respekton por obteni propran blindulpresejon, librarojn,
instituciojn kaj rajtojn.

Per la postlernejaj laboroj de la G. B. L. kun ĝia Blindul-
simfonio kaj koncertoj ni incitas la blindulojn kaj iliaj amikoj
al kunlaboro; flanke klopodas blindullibraro kaj blindullabor-
borso por edukado kaj laborodonado.

La asocio devas cian celi la homajn, sociajn kaj kulturajn in-
teresojn ideojn por tio.

Art. 4. — La asocio estas fondita por nedefinita tempo.

Instruistoj, laikaj kaj religiaj estroj de nia lando, provincoj
kaj ĉiuj flandraj komunumoj estis incitataj de ni cesigi la ekzis-
tantajn mezepokajn situaciojn.

Nia „Blindulsimfonio“ kun bonegaj blindaj artistoj, kaj
bonaj paroladistoj iris de vilago al vilago, de urbo al urbo, de
rondo al rondo.

Ni lernis la flandran popolon sati ĝiajn blindaj artistojn
kaj manlaborist(in)ojn kaj alte taksi ilin.

Ilia kuraga kaj talenta agado igis la plej bona argumento
por la eleviga blindulinstruado kaj plia blindulemancipado.

Neniu provinco aŭ regiono kiu ne audis niajn paroladistojn
aŭ ne akklamis niajn muzikartistojn.

La emancipatalo de la G. B. L. de Fl. iom post iom atingas
la flandran popolon.

La blinda pioniro Frans FITEN scias konduki lerte kaj cel-
trafe tiun batalon kaj ĝin altigi. Obstinaĵ, kasemaj kaj senhon-
traj estas la kontraŭagantoj sed ni scias ke iam la potenco ser-
vos nian idealon se ĉiuj niaj batalantoj iom post iom estos ani-
mitaj per la spirito de la afero kiun havas niaj kondukantaj
blindaj artistoj kaj manlaborist(in)oj.

Neniu okazo kapti la potencon ni preterlasos, tiu savanta
potenco povas veni de en kaj eksterlando aŭ de ambaŭ. Kiel ja

okazos : Estas honto por okcident-Eŭropo kaj Flandrujo toleri la daŭrigon la ekspluadon de la blinduloj.

Blinduloj kaj blindulamikoj de Flandrujo kaj de tuta la mondo, la flandra emancipbatalo de la blinduloj kaj la konscienco de la mondo vokas vian moralan kaj financon subtenon kaj kunhelpon.

Sendu donacojn : Oscar Mareels, 29 Ryselschebaan, Antwerpen-West

La flandraj blinduloj gis nun nur povis akiri malmultajn rajtojn, ekz. ili vojaĝas akompanataj de kondukanto senpage (sed ĉu ilia akompananto pagas ?) per tramo kaj vagonaro; sole ili vojaĝas kontraŭ pago de 1/2 bileto.

Por teatroj kaj operejoj regas sama regimo. La ĵus donita lego : stathelpo de 3.600 fr. versajne denove helpas almozpetantojn kaj nelaborulojn; sed laboremajn blindulojn oni lasos en la manko.

Tian spiriton ni ĉiuj helpos aliĝi.

IX. — **Generalaj Rimarkoj, Situacioj kaj celoj.**

La situacio de la flandraj blinduloj do estas mizera sed ne senespera.

La 15.000 flandraj estas ja politike kaj kulture hontige misuzatoj kaj ilia socia situacio estas malĝoja — sed la kontraŭstaro, la batalspirito ĉe ili vekigis.

Se la belgaj legoj permesas la hontigan privaktadon de la blinduloj je politika kampo, tio iam sin turnos kontraŭ la legfabrikistoj mem.

La intelektaj flandraj blinduloj sub la lerta gvidado de la G. B. L. de Fl., estas firme decidinaj kapti ĉiun potencon, kiu povos helpi ilin.

La grandega popolamaso komencas malrapide sed certe konsenti kaj kunlabori kun ni.

Iam igos do vera popolmovado.



Sendu donacojn :

Oscar MAREELS

29, Rijselsehe baan

ANTWERPEN-W.

(BELGIË)

Esperantistoj! Ricegu vian libron per

Amo kaj Poezio

Originala poemaro de Jan Van Schoor

La du Amatinoj

kaj

La Kapricaj de Mariano

de Alfred de Musset

majstre tradukita de Jan Van Schoor

kaj rekomendita de Esperantista Literatura
Asocio.

La libroj, bele eldonitaj, kostas nur po 2 belgoj

Mendu ilin tuj ce la eldonejo :

« LA VERDA VELO »

Julius De Geyterstraat, 149/1, Antwerpen.
Postceko 1735.09

Aŭ ce

FLANDRA ESPERANTO INSTITUTO

Gravinstraat, 32, Borgerhout-Antwerpen.

Flandra Esperantisto

**Organo de la Flandra Esperanto
Movado aperas regule ciumonate.**

kun interesaj artikoloj pri la **esperanta** kaj la **flandra movado**, la luktado de l'**subpremitaj popoloj**, **anti-militarismo** kaj **bonstilaj literaturaĵoj**.

ABONPREZO:

2 belgoj por Flandrujo.

3 belgoj por la eksterlando.

Redaktoro kaj Administranto :

Jan VAN SCHOOR

Julius De Geyterstraat, 149/1

Antwerpen.

Postceko : 1735.09